


# Usona **Esperantisto**

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2010:3 (maj-jun)

**American  
Esperantist**  
★  
Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2010:3 (May-Jun)

*“Lando de libereco,  
lando de estonteco,  
mi vin salutas!”*

– L. L. ZAMENHOF, 1910



## Ĉu vi iros al la LK en Vaŝingtono? Aliĝu tuj!

**Ĉi-numere:** Detaloj pri la venonta landa kongreso • *Games for students* • Zamenhof en Costa Mesa? Enesperantigi Shatner-on • *Geoghegan and the “Unua Libro”* • Rezultoj de la inversa tradukdefio • kaj pli!

# Usona **Esperantisto**

**Dumonata bulteno • Bi-monthly bulletin**

Vol 49, No 3 — 2010:3 (maj-jun)

Redaktisto • Editor: HOSS FIROOZNIJA

Sendu kontribuojn al • Send contributions to:

✉ bulteno@esperanto-usa.org

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CPU 271205, U. of Rochester  
Rochester, NY 14627-1205, USA

*Usona Esperantisto (American Esperantist) is the newsletter of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your email/postal address, and a photo of your face. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.*

*You may reprint content from this publication if you give credit. Please send a copy of any reprinted materials to the address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.*



*Usona Esperantisto* estas la bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere uzu retoŝton, kaj aldonu viajn nomon, (ret)poŝtadreson kaj foton de via vizaĝo. Kun aliaj fotoj bonvolu aldoni noton pri la dato, loko, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn de la bulteno kun fontindiko. Bonvolu sendi al la supra adreso ekzemplerojn de ajnaj publikigitaj materialoj. Opinioj esprimitaj en la bulteno apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas la vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktisto.



**esperanto  
usa**

**Centra Oficejo • Central Office**

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

**Direktoro • Direktoro, CO:** William B. HARRIS

**Prezidanto • President:** Philip G. DORCAS

**Vicprezidanto • Vice President:** Tim WESTOVER

**Sekretario • Secretary:** Julie SPICKLER

**Kasisto • Treasurer:** Christopher ZERVIC

**Aliaj estraranoj • Other board members:** Ĵenja AMIS,  
Mar CÁRDENAS, D. Gary GRADY, Anjo HARLOW, ROS Haruo,  
Tor KINLOK, Orlando E. RAOLA, Julie WINBERG

## Anonco de la prezidanto

Per la statuto de Esperanto-USA (ELNA) kaj per la aprobata propono de nia pasinta landa kongreso, mi rajtas nomi la kasiston por la vaka posteno. Mi nomas s-ron Christopher ZERVIC nia kasisto.

S-ro Zervic estas konata kaj estimata profesiulo, kiu jam servis en kelkaj postenoj. Li estas aktiva kaj respondeca. Li komprenas la taskojn, jam uzas la saman financon programaron kiel nia Centra Oficejo, kaj akceptas la rolon. Li kunlaboros multe kun nia direktoro (Vilĉjo HARRIS) kaj la antaŭa kasisto (Anna BENNETT). Lia nuna deĵoro finiĝos ĉe la landa kongreso en 2012.

Christopher aperas kiel kandidato por estrarano sur la nuna balotilo. Li nun estas la kasisto, kaj la aliaj kandidatoj plenumos la postenojn por la estraro.

Ni elkore dankas al s-ro Zervic por akcepti la postenon. —Filipo DORCAS, prezidanto



*According to the by-laws of Esperanto-USA (ELNA) and according to the approved motion of our previous national congress, I have the right to name the treasurer for the vacant position. I name Christopher Zervic to be our treasurer.*

*Mr. Zervic is a known and esteemed professional who has already served in several posts. He is active and responsible. He understands the job, already uses the same financial software as our Central Office, and accepts the role. He will work closely with our director (Vilĉjo Harris) and our previous treasurer (Anna Bennett). His term of office will continue until the national congress in 2012.*

*Christopher is already a candidate for board member on the current ballot. He now is treasurer, and the other candidates on the ballot will fill the board positions.*

*We heartily thank Mr. Zervic for accepting the position. —Phil Dorcas, president*

**We need you!** Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly magazine *Usona Esperantisto*, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: \_\_\_\_\_

Address: \_\_\_\_\_

City & State: \_\_\_\_\_

Postal code & Country: \_\_\_\_\_

Phone & Fax: \_\_\_\_\_

E-mail: \_\_\_\_\_

Birthdate (M/D/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_/\_\_\_\_ Ham radio call: \_\_\_\_\_

In the member list, don't publish my:  address  phone  fax  email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

Friend of Esperanto ..... \$10.00  
(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)

Youth (you must be under 27) ..... \$20.00

Limited Income ..... \$20.00

Individual ..... \$40.00

Family ..... \$60.00

Sustaining ..... \$80.00

Life (birthdate required) ..... \$800.00

Credit card info:  Visa  Mastercard

Number: \_\_\_\_\_ Expires(M/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_

Card verification #: \_\_\_\_\_ (three digits on back of card, or on front for AmEx)

# Final Call! Esperanto-USA Congress, May 28–31, 2010

Here are just some of the speakers and presentations we have planned:

- **Joel BROZOFSKY:** *Nia sunsistema orbito*
- **Arika OKRENT:** *Invented Languages*
- **Humphrey TONKIN:** *Esperanto en la nuna mondo*
- **Esther SCHOR:** *Poetry Roundtable*
- **Ron GLOSSOP:** *Skajpu vive kun rusoj*
- **Drissa Flayoro DIAKITE:** *Esperanto en Afriko, Life in Mali*
- **Ralph DUMAIN:** *Zamenhof in Washington*
- **Lusi HARMON:** *Kial mi ne povas iri al Kubo?*
- **Franklin MONTENEGRO-RODAS:** *Ĉu ni estas kion ni manĝas?*
- **Phil & Elizabeth DORCAS:** *Bible Study, Kristana Di-servo*
- The new film *Conlang* will be shown (kun subtitoloj en Esperanto), winner of “Best Short Film” at the *Boston Sci-Fi Film Festival*.

## And more...

**Sherry WELLS** – games/ludoj • **Hoss FIROOZANIA** – beginners’ courses  
**Jed MELTZER** – yoga/jogo • **Neil BLONSTEIN** – activities at the United Nations

## Special Excursion to the Library of Congress (LoC)

...with host **Lee DOUGLAS**, LoC expert on Esperanto

## Plus:

Interkona Vespero • Bankedo • Ekskursoj  
Aferkunsidoj de Esperanto-USA

*“En via lando, usonaj samideanoj, nia afero estas ankoraŭ tro juna...”*

—LLZ

Sign up online:

<http://esperanto-usa.org>



## Regional events

What follows is brief a sampling of upcoming events either conducted in, or relating to Esperanto. For a more comprehensive list of events worldwide, see <<http://www.eventoj.hu/2010.htm>>. If you'd like us to list your event, please contact the editor.

### 22 – 24 May (Trois-Rivières, QC)

#### **MeKaRo: Mez-Kanada Renkontiĝo**

The 7th annual mid-Canada gathering. For information, visit <<http://www.esperanto.qc.ca>>, send email to <[informo@esperanto.qc.ca](mailto:informo@esperanto.qc.ca)> or write to Esperanto-Societo Kebekia, 6358-A, rue de Bordeaux, Montréal (Québec) H2G 2R8, Canada.

### 28 – 31 May (Washington, DC)

#### **Landa Kongreso de Esperanto-USA**

The national conference for Esperanto speakers in the USA. Three days of talks, courses, trips to sites in DC, and much more. Don't miss it! For more info, see <<http://esperanto-usa.org>>.

### 19 – 21 June (Phoenix, AZ)

#### **Verda Domo of Arizona**

Mountain camping near the Grand Canyon during a Native American Festival. Contact Angéline Taremi <[angelinata@aol.com](mailto:angelinata@aol.com)> or visit <<http://verdadomo0.tripod.com>>.

### 28 June – 16 July (San Diego, CA)

#### **NASK: Nord-Amerika Somera Kursaro**

The world-famous North American Summer Esperanto Institute meets for three weeks at UC San Diego. Study Esperanto by the beach and get five college credits from the University of California! Scholarships are available, but space is limited. For more info, see <<http://esperanto.org/nask>>.

### 11 – 17 July (Matanzas, Cuba)

#### **Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

43rd annual conference of ILEI in Matanzas, Cuba. See <<http://ilei.info>> or contact <[info@ilei.info](mailto:info@ilei.info)>.

### 17 – 31 July (Havana, Cuba)

#### **Universala Kongreso de Esperanto / IJK**

The 95th International Congress in Havana, followed by the *Internacia Junulara Kongreso* (international youth congress). See <<http://uea.org>> or contact <[uea@co.uea.org](mailto:uea@co.uea.org)>.

## Local group meetings

Local groups provide opportunities for both experienced speakers and new students alike. Most meet at least monthly, and often weekly. The following is a list of contacts for some of the larger groups with regular meetings; for a more complete list, see our website.

### California

**Sacramento:** <http://esperanto.org/us/esos>

**San Diego:** <http://groups.yahoo.com/group/EsperantoGrupodeSanDiego>

**San Francisco:** <http://esperanto.org/us/SFERO>

**Santa Barbara:** [dorothyjeanh@gmail.com](mailto:dorothyjeanh@gmail.com)

**Los Angeles:** <http://fizzylogic.com/users/bulbul/esperanto/konversacia-rondo>

**Colorado** (Longmont) <http://ek-ek.org>

**Connecticut** (Wallingford) <http://esne.net>

**District of Columbia** <http://esperantodc.org>

**Georgia** (Atlanta) <http://esperanto-atlanta.org>

**Hawaii** (Honolulu) <http://esperanto.org/us/Honolulu>

**Idaho** (Boise) <http://terpomuloj.org>

### Illinois

**Champaign-Urbana:** <http://ekoci.org>

**Chicago:** <http://esperanto-chicago.org>

**Maine** (Bangor, Houlton) <http://esne.net>

**Massachusetts** (Acton, Amherst, Cambridge, Northampton) <http://esne.net>

**Missouri** (St. Louis) <http://esperanto-stl.org>

**New Jersey** (Princeton)  
<http://esperanto-nj.tripod.com>

### New York

**New York:** <http://esperanto-nyc.org>

**Rochester:** <http://esperanto.lodestone.org>

**Ohio** (Cincinnati) <http://ligileto.freeshell.org>

### Texas

**Austin:** <http://esperantaklubo.konfuzo.net>

**Dallas:** <http://esperanto-tx.org>

**Virginia** (Hampton Roads) <http://bonege.com>

**Washington** (Seattle) <http://seattleesperanto.org>

**Wisconsin** (Madison) <http://groups.google.com/group/esperanto-societo-madison>

## El la centra oficejo

de la Direktoro, Vilĵo HARRIS

*Please be sure to let us know when you change your address. Some of the mail we send is forwarded to you and some is not. Which items are forwarded? Why not all?*



Se temas pri unuopaj leteroj, Esperanto-USA sendas ilin unuaklase, kaj ĉiam la poŝt-instanco plusendas tiajn leterojn.

Se temas pri poŝtajo sendita amas-poŝte (angle: *bulk mail*), estas du elektoj:

- *Address Service Requested*: Por elekti ĉi tiun metodon, ĉiu koverto devas havi la frazon "Address Service Requested" en specifa loko. Se la ricevonto translokiĝis kaj sciigis la poŝt-instancon pri la translokiĝo, la poŝt-instanco ja plusendos la poŝtajon. Se la poŝtajo ne estas liverebla, oni resendos ĝin al E-USA kaj igos nin pagi la koston de unuaklasa poŝtmarko (nun \$0.44).
- *Or Current Resident*: Por elekti ĉi tiun metodon, ĉiu adreso devas havi la frazon "Or Current Resident" tuj post la nomo kaj antaŭ la strat-adreso. La poŝtisto simple liveros la poŝtajon al la strat-adreso, kaj neniam sendos iu ajn informon al E-USA.

Poŝtajoj, kiujn ni sendas **nur** al membroj, estas senditaj per elekto "Address Service Requested". Ekzemploj: balotilo kaj membrolisto.

Poŝtajoj, kiujn ni sendas ne nur al membroj, sed ankaŭ al aliaj individuoj kaj grupoj, ni sendas per elekto "Or Current Resident". Ekzemploj: bulteno kaj realiĝ-letero.

Por certigi, ke vi ricevos ĉiun poŝtajon de ni, nepre sciigu nin kiam vi translokiĝos! ★

## Kurso en norda Teksaso

Raportas d-ro Fred MEYER III

Nekrokodila semajnfina kurso okazis de 19–21 februaro kun 13 partoprenantoj ĉe la hejmo de Filipo kaj Beth DORCAS en Fort Worth, TX. La Esperanto-Klubo de Norda Teksaso aŭspiciis la kurson.

Partoprenantoj plejparte restis ĉe la studdomo dum la tuta semajnfino. Viroj dormis je la unua etaĝo sur lito, sofo, faldlitoj, kaj eĉ la planko. Virinoj dormis supre sur litoj. Ili kuiris manĝojn kune sub la estrado de Susan MEYER kaj konversaciis ĉirkaŭ la manĝotablo.

La semajnfino komenciĝis kun konversacio, manĝado, kaj kantado. Kelkaj prezentis diversajn temojn aŭ gvidis grupan studadon. Ron kaj Lynne WOLF gvidis studon de vorto-listo pri la korpo kaj vestoj. Jarlo BILLS gvidis studojn de simplaj verboj kaj de korelativoj. Fred MEYER kaj Beth DORCAS prezentis pri transitivaj kaj netransitivaj verboj, -ig kaj -iĝ. Oni uzis ankaŭ partojn el *Mazi en Gondolando* kaj *Pasporto al la Tuta Mondo* dum la semajnfino.

Ĉiu partoprenanto etikedis minimume kvin objektojn aŭ lokojn en la domo. Dimanĉe la grupo iris tra la domo parolante pri la etikedaj vortoj kaj finante kun plaĉa diskuto sur la balkono.



*Unua vico*: Filipo kaj Beth DORCAS, Dorothy BOISSEAU, Chris ANDERSON. *Dua vico*: Susan MEYER, Carol BRANDON, Lynne WOLF, Tom BOISSEAU, Jarlo BILLS. *Tria vico*: Fred MEYER, David WHITE, Mary Fay MARKS, Ron WOLF.

## Renkontiĝo kun... kiu?!



En aprilo, membro Keneĉjo GOLDBERGO (supre, maldekstre) havis okazon fotiĝi en Costa Mesa (proksime al Losanĝeleso) kun juda okulisto el Bjalistoko. La bonkora kuracisto diris, ke li iniciatis novan planlingvan komunumon por unuigi la popolojn “en unu grandan rondon familian...”

Kompreneble, ne temis pri Zamenhof mem, sed pri aktoro Tony AMENDOLA – kiu ludis la rolon de Ludoviko ZAMENHOF en nova teatraĵo *The Language Archive*. (S-ro Amendola estas eble plej bone konata pro sia rolo en la televidserio *Stargate SG-1*.)

La teatraĵon prezentis la grupo *South Coast Repertory*. Por pli da informo, vidu la TTT-ejon de la teatraĵo, kiu prezentas interalie longan historion de Zamenhof kaj Esperanto: <<http://www.scr.org/interactive/dialoguemar10/languagedialogue.aspx>>



## Enesperantigi Shatner-on

Raportas Detlef KARTHAUS

La filmfirmao Cineflix lastatempe petis helpon de Kanada Esperanto-Asocio pri traduko de dialogo en Esperanton. Ĉar la firmao situas en Toronto, la peto atingis min. Mi ne klare memoras ĉu mi volontulis aŭ ĉu mi estis elektita, sed blindigita per revoj de hollywooda kariero, mi konsentis.



La firmao preparis programon pri nekonataj aŭ malmulte disvastigitaj lingvoj. Ne, ne temis pri Esperanto. La ekzamenota lingvo estis la “vojniĉa”, tiom malmulte konata ke en Esperanto ĝi ŝajnas ankoraŭ ne havi nomon – en Vikipedio troviĝas informo pri la “Voynich-manuskripto ... mistera skribaĵo, kies aĝo, deveno kaj aŭtoro estas nekonataj.”

La prezentisto de la programo estos neniu alia ol nia malnova amiko William SHATNER, kiu ĉefrolis en la esperantlingva filmo *Incubus*. Li enkondukos la ideon de malmulte konataj lingvoj parolante en Esperanto.

Shatner diros ke li lernis Esperanton en la sesdekaj jaroj de la lasta jarcento por la filmo en kiu li ĉefrolis. Nur tiun frazon mi devis traduki, kaj fari sondosieron, kiu estos sendita al Shatner, tiel ke li povos ekzerci sin por elparoli ĝin ĝuste. La programon elsendos *History Channel* verŝajne en junio aŭ julio.

Nu, pri unu afero mi ankoraŭ okupiĝas. Ĉu Shatner havos mian germanan akĉenton? Ĉu tio estos la komenco aŭ la fino de mia hollywooda kariero?

## La “inversa” tradukdefio

Ĉi-monate, ni pritraktas defion inversan al niaj kutimaj proponoj – nome, traduki Esperanton en la anglan. Temas pri la unuaj versoj de la fama epopea poemo de William AULD, *La Infana Raso*.

Enkonduke al la artikolo ĉi-monata, ni volas citi el letero de Stevens NORVELL. Li bone resumis kelkajn gravajn punktojn pri tia tradukado:

*Kaj jen nova defio. Oni devas ne nur translingvigi la ideojn, sed nun oni devas elekti vortojn kaj aranĝi ilin tiel, ke la voĉlegataj sonoj kaj ritmo poezie frapas la orelojn.*

Jen la kerno de poezio-tradukado. Estas facilege simple anstataŭigi vortojn en lingvo A per vortoj en lingvo B; sed estas malfacilege redoni poemon el lingvo A en lingvo B kiu restas bona poemo, enhavas la samajn ideojn, kaj konservas ĝis iu grado la samajn formon kaj stilon.

“Ĝis iu grado” varias de poemo al poemo. Iuj poemoj preskaŭ plene apogas sin je siaj ritmo kaj rimskemo. Tradukoj de la Poe-aj poemoj *La Korvo* kaj *La Sonoriloj* certe estus plene malsukcesaj se la tradukanto ne konservus la ritmon kaj rimon. Eĉ *Ebrio* de Auld havas frapajn ritmon kaj rimon. Tradukantoj de tiaj poemoj, farante la damne malfacilegan taskon redoni poemon en alian lingvon, ŝanĝas vortojn, ellasas fragmentojn, kaj ofte devas signife modifi la enhavon de la poemo por reteni la formon. Kio pri la unuaj versoj de *La Infana Raso*? Ĉu la rimo kaj ritmo tiom gravas, ke la tradukanto pritondu la tekston por reteni la formon, aŭ ĉu la enhavo pli gravas? Ĉu estas akceptebla, se la formo



Lee MILLER



Tim WESTOVER

En ĉi tiu rubriko ni prezentas tradukdefiojn por vi. Leginte viajn tradukojn, ni faros resumon de la plej bonaj provoj kaj sukcesoj, kune kun komentoj kaj reagoj pri kelkaj malpli sukcesaj rezultoj. Bonvolu sendi **ne** plurajn diversajn provojn, sed **nur unu** tradukon antaŭ la **1-a de julio** al:

**[bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org)**

iom elkreskas la originalan aspekton? Ĉiu tradukanto havas siajn proprajn respondojn al tiuj demandoj.

Ni dankas al EJL, RW, SN, SM, kaj GB, kiuj kuraĝis alfronti tiujn demandojn kaj sendis tradukojn al ni. Pri la tradukoj ĝenerale, ni povas diri ke tiuj, kiuj fidelas, ne tiom belas kiom la originalo, kaj tiu, kiu iom belas, ne fidelas. (Tiu lasta, efektive, estis provo redoni la tekston en formo de serio de limerikoj – pri ĝi ni parolos aparte!) La provoj estas interesaj, ĝuindaj, sed neniu oni povas nomi bona angla-lingva poemo. Leginte ilin, oni nepre havas la senton de traduko – kiel apogilo por kompreni la Esperantan originalon ili estas utilaj, sed por komprenigi la entuziasmon de esperantistoj por tiu ĉi poemo, ili ne tiom sukcesas.

*La Infana Raso* uzas tre varian aron de stiloj, tonoj, kaj rimskemoj. En la komencaj versoj, kiujn ni pritraktas, la rimskemo estas strikte AABB kaj la tono estas iom leĝera kaj rapida, kun tri kriostrekoj kaj longa paranteza frazo (kiu fakte estas



preskaŭ duono de la proponata teksto). El la tradukintoj, nur RW uzis rimskemon, kaj li elektis AABBA – la formon de lim-eriko.

Ni pensu pri la unuaj vortoj, en Esperanto jen:

### **Saluton, masonisto, mia prapatro Ruben.**

Tuj aperas problemo: kiel redoni en la angla la tre simplan “Saluton”. Ĉu “Hello”? Ĉu “Greetings”? Ĉu “Hail”? Ĉu “Hey there”? La tradukintoj proponis:

- *Greetings, mason, Ruben my forefather*
- *Greetings, O mason, my forefather Ruben*
- *Hi there, stone builder, my forefather Ruben*
- *Greetings Ruben, my ancestor the mason*
- *Hail, Ruben...*

“Hi there”, kompreneble, estas tro neformala. Sed “Greetings” kaj “Hail” estas tro formalaj, certe en la moderna angla. (Pensu pri “Greetings, Earthlings”).

Oni povas demandi ĉi tie ĉu la vorto vere rilatas al normala saluto, aŭ ĉu ĝi havas alian signifon. Ĉu eblas frazo kiel “I think now of you, my ancestor Ruben, the mason”? Aŭ eble “I see you, Ruben, my ancestor, the mason.” Ĉu “I greet you” estas pli bona ol “greetings”? Ĉu eblas uzi simple “Hello”? Alia elekto estus ellasi la vorton: “Ruben the Mason, my ancestor...” kaj daŭrigi la parolon kvazaŭ rekte al Ruben. Eblas ankaŭ elekti “I salute you, Ruben the Mason, my ancestor” – kvazaŭ saluto al eminentulo.

Poste venas:

***kiu dum tuta vivo grimpadis supren-suben,  
ĉizante sur preĝejoj gargojlojn kaj anĝelojn.***

Por la unua verso, la tradukintoj donis:

- *Who clambered up and down his whole life*
- *Who lifelong did clamber upward and down*
- *Who during a lifetime climbed up and down*
- *Who all your life climbed ladders up and down*

La lingvo ne estas natura en tiuj ĉi poemoj. Ili pensigas nin pri “I threw momma off the train a kiss” kaj simile. “You spent your lifetime climbing up and down” estas pli normala maniero esprimi la ideon en la angla. Kaj ne estas kialo komenci per “Who”: “Your whole life you climbed up and down”, ekzemple. En la angla oni ofte parolas pri “work”: “You worked your whole life climbing up and down”. Ni kredas ke la tradukintoj ial sentis ian devon sekvi la esperantan formon, kaj ne pensis pri la angla formo.

Por la posta verso, ni ricevis:

- *chiseling gargoyles and angels on cathedrals*
- *chiseling angels and gargoyles on places of worship*
- *chiseling gargoyles and angels on churches*
- *chiseling on churches gargoyles and angels.*

Denove ni demandas, kial resti kun “chiseling”? Ĉu ne en la angla oni kutime parolas pri “carving”? Aŭ “sculpting”?

Ni povus proponi tekston kiel:

*My ancestor Ruben, stonecarver of renown,  
You worked your whole life, climbing up  
and down  
churches, carving angels, and gargoyles  
with tails.*

Ĉu ne eblas foriri de la precizaj vortoj por kapti iajn ritmon kaj rimon? Tiu “tails” bone rimiĝos kun “sails” en la sekva verso...

Ni pensu nun pri alia verso: **kaj la filinon duan de tavernisto svatis**. D-ro Norvel ĉi tie komentis:

*Auld misuzis la vorton, 'svatis'; pro tio ke, li estis majstro de nia lingvo, mi devas supozi, ke li faris tion tutintence kaj ironie. Mi dubas, ĉu la plejparto el anglalingvaj legantoj eĉ komprenus la nocion pri profesie aranĝitaj geedziĝoj. Do, anstataŭ la vortojn 'propositioned' aŭ 'seduced', mi elektis la vorton 'wooed' por esti almenaŭ iomete ironia.*

Ni ricevis:

- *courted the barista's younger daughter*
- *wooed the daughter, next to the eldest, of a publican*
- *proposed to the second daughter of a drunkard*
- *wooed the innkeeper's second girl*

Ni ne certas pri "barista"; certe ĉi tie "drunkard" ne estas ĝusta. Kaj "publican" estas apenaŭ konata vorto en la angla, krom en la *Nova Testamento*. "Innkeeper" estas ebla elekto. Kio pri "bartender"? Aŭ "bar owner"? Kio pri "Wooed the bartender's younger daughter"?

Sufiĉas diri, ke kion ni ĉefe ricevis ne estis poemoj, sed prozaj klarigoj pri la poemo de Auld. Unu, tamen, RW, alfrontis la defion alimaniere, kaj verkis serion de limerikoj. Jen poemo, kaj tion ni laŭdas kiel amuzan majstroverkon, kvankam ĝi estas ŝerca traduko de la sufiĉe serioza *La Infana Raso*. Jen ekzemple la unua strofo, limerike:

*Ancestor of mine climbing churches!  
Hail, Ruben, in stony high perches,  
in sunshine or drizzle  
by hammer and chisel  
an angel or gargoyle emerges!*

Ŝajnas al ni ke ni devos atendi ĝis aperos en la angla bona poezia traduko de *La Infana Raso*, traduko kiu redonos la ritmojn kaj fortan senton de la originala. Kaj ni povas demandi ĉu eĉ eblus. Ĉu la poemo estas tiel forte ligita al Esperanto ke en alia vesto ĝi simple malaperas?

Estas menciinde ke jam aperis anglalingva traduko de *La Infana Raso*, de Girvan MCKAY. Ĝi legeblas en la reto ĉe: <[http://www.everk.it/phpwcm\\_filestorage/4/4\\_3.pdf](http://www.everk.it/phpwcm_filestorage/4/4_3.pdf)>. Ĝin ni ne prikomentas ĉi tie; sed ni proponas ke vi analizu la unuajn versojn. Ĉu ĝi sukcesas? Reagoj kaj leteroj estus bonvenaj.

Por la venonta defio, el *Slaughterhouse-Five* de Kurt VONNEGUT:

Billy couldn't read Tralfamadorian, of course, but he could at least see how the books were laid out—in brief clumps of symbols separated by stars. Billy commented that the clumps might be telegrams.

"Exactly," said the voice.

"They are telegrams?"

"There are no telegrams on Tralfamadore. But you're right: each clump of symbols is a brief, urgent message—describing a situation, a scene. We Tralfamadarians read them all at once, not one after the other. There isn't any particular relationship between all the messages, except that the author has chosen them carefully, so that, when seen all at once, they produce an image of life that is beautiful and surprising and deep. There is no beginning, no middle, no end, no suspense, no moral, no causes, no effects. What we love in our books are the depths of the many marvelous moments seen all at one time. ★

## Games for students

One way to liven up a class (or a club meeting) is to introduce a game. The more a game involves speaking, the more suited it is to language teaching. Chess, for example, would probably not be a good choice. In addition, a game should be neither too hard nor too easy for the players' command of Esperanto. Finally, it has to be fun, or you might as well do grammar exercises.

Most toy departments have a selection of children's board games that can be adapted for class use with varying degrees of effort, and there are plenty of what used to be called "parlor games" (like Charades) that require little or no equipment.

Some games are suited even for a beginning course. For example, you can buy the prerequisites for Bingo for as little as a few dollars, and it's quite good practice for understanding and interpreting the names of numbers. It helps students get past such initial confusion as misinterpreting "tridek" because of interference from the English word "thirteen" (and similarly for the other "teens"). In my experience, students who have just learned the numbers have a surprising amount of fun playing Bingo because the frustration level is just right, making it just difficult enough to be entertaining.

A good game for building vocabulary is *Clue*, the mystery game in which players guess that the crime was committed by "Fraŭlino Blua en la salono per la tranĉilo" and the like. You can use a label-maker to replace the text on the board and the cards with Esperanto. You can add to the fun by introducing additional characters, locations, and objects, and offering different



**D. Gary GRADY**

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

[dgary@mindspring.com](mailto:dgary@mindspring.com)

ways of phrasing an accusation, "Mi sugestas, ke la ĉef-ministro mortigis la kelneron per la florpoto sur la tegmento" or "Mi opinias, ke faris la krimon la ĝardenistino uzante la katon apud la sofo."

